revuo

# Babilanto

INFORMILO DE AGADO POR LA PROGRESIGO DE ESPERANTO EN TOGOLANDO

n-ro 13 oktobro – decembro 2015



Karaj legantoj,

Pli malpli da aktivaĵoj okazis post la ĵus antaŭa eldono. Tiu ĉi nova numero raportas kelkajn el tiuj okazintaĵoj.

Decembro, naskiĝ-monato de la iniciatinto de Esperanto, estas okazo por la grupo APETO inviti vin al sia 4-a Ĝenerala kunveno, lige kun la tradicia Tago de Zamenhof.

Ni fidas vian ĉeeston por prezenti Esperanton kaj paroli niajn atingaĵojn al viaj amikoj kaj gekonatuloj en la universitata centro *St Jean* de Lomeo, sabate la 12-an. Ni plezure bonvenigos vin ĉiujn tie.

[Aĝevi Aĝe]

*Chers lecteurs,*


*Pas mal d'activités se sont passées depuis la dernière parution. Ce nouveau numéro vous fait part de certaines de ces activités.*

*Décembre, mois de la naissance de l'initiateur de l' Espéranto, est l'occasion pour le groupe APETO de vous inviter à sa 4ème Assemblée générale, dans le cadre de la célébration de la traditionnelle "Journée Zamenhof".*

*Nous comptons sur votre présence pour présenter l'Espéranto et parler de nos activités à vos amis et connaissances au centre universitaire St Jean de Lomé, le samedi 12. Nous vous y accueillerons avec plaisir.*

***Adjévi Adjé***

## Ek al la Tago de Esperanta libro!




***El togolanda saĝosako*** **de Adjévi Adjé estas kolekto de popolaj rakontoj, fabeloj, legendoj, mitoj, fabloj kaj proverboj en Togolando. La teksto de la verko estas verkita en simpla kaj klara stilo, tiel ke la leganto povas facile ĝui la komprenon kaj fari al si ideon pri afrika saĝo.**

**Tiu verko aĉeteblas ĉe la libro-servo de UEA kaj ĉe MAS. Okaze de la naskiĝtago de Zamenhof, ankaŭ Tago de Esperanta libro, oni povas rekomendi ĝin al kon-atoj aŭ donaci ĝian ekzempleron al siaj rondanoj, ekzemple.**

La aŭtoro de la verko ne nur pas-igis sian infanaĝon en vilaĝo, kies memorojn li gardas, sed li ankaŭ faris kolektlaboron ĉe respondecaj personoj pri la tradicio de sia devena medio. Adjévi profitis el maljunuloj dum la kolekto de proverboj, ĉar la fame konata verkisto Ahmadou Hampaté Bâ instruis nin, ke la mal-junuloj konsistigas grandan biblio-tekon por Afriko. Cetere, la titolo de la verko atestas tion, parolante pri sako de togolanda saĝo.

Nu, kio pli motivis la verkinton, tio estas ne nur la memoraĵoj de lia vilaĝo, sed ankaŭ la kuraĝo kaj la persistemo kun kiuj tiuj tekstoj origine parolaj estis transskribitaj kaj tradukitaj al la lingvo, universala sed kiu, farante sian vojon ankoraŭ ne atingis plene sian destinon. Esperanto, malgraŭ sia universaleco kaj kapablo esprimi ĉiaspecan penson, restas relative mi-noritata kompare kun aliaj lingvoj kun internaciaj trajtoj. Alie, kiom da homoj scipovas Esperanton en la vilaĝo Anjronkope, la inspira fonto de la kompilinto? Al kiu do adre-siĝas tiu verko? Tiel la entuziasmo de la aŭtoro valoras meriton, ĉar li montris per la pruvo iun orginal-econ kompare kun iuj afrikaj verk-istoj, rilate al la elekto de la lingvo.

Adjévi elektis eldoni pure afrikajn realaĵojn en Esperanto, ĉar lia unua intenco estas disvastigi la lingvon en Afriko kaj eluzi ĝin por diskonigi tiujn realaĵojn tra la mondo. Certe li ankaŭ volis elmontri sian kapablon kaj lingvo-scion. Tiu ĉi libro estas aldona valoro al la propagandaj kulturaj klopodoj de Esperantistoj nuntempe. La deziro de Adjévi estas konservi la kulturon de ties medio, kiu endanĝere ŝanĝiĝas, trans-formiĝas kaj eĉ malaperas sub la eksteraj influoj.

**El kritikoj de Nouwoatsi K. Sénam**

**Tous à la traditionnelle**
**"Journée de Zamenhof"**
**le 12 décembre 2015**
**à 15h, Centre Universitaire**
**St Jean de Lomé**
**(Agora Senghor)**

## Ne nur la Z-Tago...

La 15-a de decembro estas la naskiĝtago de L.L. Zamenhof (1859-1917), kreinto de Esperanto. Laŭ iniciato de unu el niaj signifaj verkistoj, Julio Baghy, ni festas tiam ankaŭ la E-kulturon.

Por la plialtigo de la spirita nivelo de la esperantistaro, Baghy proponis ke la Z-tago estu ankaŭ la tago de la E-libro. Dum kultura evento lokaj grupoj informu neesperantistojn pri la internacia lingvo, ties abunda literaturo originala kaj tradukita. Ni elmontru, kiel nia movado disvastigas kulturverkojn de diversaj etnoj, ebligante al alilingvanoj la ĝuadon de verkoj alipopolaj.

Tio estu nia Z-taga kontribuo al justa, egalrajteca komunikado, kiu respektas lingvan, kulturan diversecojn, strebe al daŭripova konservado de tiuj riĉecoj, rajtoj.

Krom okazigo de kunvenoj, eventoj, prelegoj pri Zamenhof, tiutage ni celebru la Esperantan literaturon ankaŭ per aĉeto, legado de nova libro!

**Stefano Keller**

## Afriko dum kongreso en Japanio



Mi partoprenis en Japanio la 16-an E-Kongreson de Tyugoku kaj Sikoku, kiu okazis de la 31-a de oktobro ĝis la 1-a de novembro 2015 en la urbo Simonoseki. En la kongreso, mi prezentis pri la trilanda kongreso en Bandung, Indonezio, la 6-a Afrika Kongreso de Esperanto en Burundo kaj la 102-a UK en Seulo, Koreio.

Aparte estas raportinde, ke 18 kongresanoj povis iom kotizi por la kampanjo subtene al partoprenigo de Afrikaj Esperantistoj en la Afrika Kongreso, kiu okazos la sekvan aŭguston. Kelkaj el la kongresanoj ankaŭ povis aĉeti la libron 'Afrikaj proverboj' de s-ro Adjevi ADJE, la kunordiganto de Afrika Komisiono de UEA.

En la fino estis kolektita entute bagatela sumo egala al 277 eŭroj: 217 eŭroj pro la kampanjo subtene la Afrikan Kongreson kaj 60 eŭroj pro aĉeto de la libro 'Afrikaj proverboj'. La tuta sumo transiris al la Afrika konto ĉe UEA. Koran dankon al la kongresanoj, kiuj volonte kontribuis en la monkolekto.

**LEE Jungkee, estrarano de UEA**

## Babilmanĝo en la rapida restoracio "Sweet-Land"

Sabate, la 31-an de oktobro 2015, partoprenis tiun kunvenon dek Lomeaj Esperantistoj el kiuj estis artisto, lingvo-instruistoj, profesiuloj pri kontado, studentoj k.s.

Ĉiuj unue ricevis amikan akceptadon kun prezentado de periodaĵoj kaj diversaj legaĵoj. Meze de diskutoj oni manĝis kuketojn, hamburgerojn kaj trinkis bierojn kaj refreŝigaĵojn.

S-roj Kouevigan Koffi kaj Nouwoatsi Kossi informis pri *Agado-Espero*, internacia projekto sub iniciato de eks-prezidanto de Aŭstralia Esperanto-Asocio s-ino Dianne Lukes por sproni la enkondukon de Esperanto en elementajn lernejojn cele al interklasaj interŝanĝoj. S-ro Adjé Adjévi prezentis kunlaborproponon de ganaaj e-istoj por reciproka interŝanĝo de studentoj inter ambaŭ landoj. Estas decidita Ĝenerala kunveno je la 12-a de decembro, lige kun la tradicia Tago de Zamenhof. La kunvenantoj same kleriĝis pri Esperanto-renkontiĝoj en tiu ĉi kaj en la tuj postaj jaroj tra Esperantujo.




Kelkaj el la partoprenantoj

Babilmanĝo estas aranĝo de APETO kun amuza kaj eduka programoj, kiu celas kreskigi kaj fortigi la amikajn rilatojn inter Lomeaj Esperantistoj. Ĝi rolas ankaŭ kiel rendevuo por revidi unu la alian kaj renkonti laŭokaze alilandajn Esperantistojn. Temas pri vera forumo, kie ĉiuj havas eblon viglavoĉe esprimi siajn opiniojn, starigi demandojn aŭ fari proponojn ĝenerale pri aktualaj temoj.

Tiu tradicio jam estas tri-jara dum tiu ĉi jaro, ĉar ĝi komenciĝis en 2012.

**A. Adjévi**

# Esperanto pli kaj pli eniras togolandajn lernejojn



En Togolando ĉiuj lernejoj malfermis la pordojn, kadre de la nova lerno-jaro, la 28-an de septembro 2015. Tiam la mezgrada lernejo "King's Tech" de Notse (100 km norde de Lomeo) malfermis la siajn, sed ĝi ankaŭ unuafoje decidis akcepti Esperanto-kurson sine de si. Tiun kurson gvidas s-ro Amevor Koadjo po unu horon semajne al 22 gelernantoj de la unua klaso.

S-ro Amevor Koadjo ne ŝparas sian energion por konigi kaj disvastigi Esperanton inter la enloĝantoj de la urbo de Notse. Li reklamas pri ĝi tra afiŝoj, disdono de informfolioj kaj foje tra radiaj programoj, kun subteno de Afrika Komisiono de UEA.

Koadjo mem lernis Esperanton en la jaro 1987. Li vojaĝis i.a al Gabono, kie li provis instrui en televida programo. Li estis vicprezidanto de Unuiĝo Togolanda por Esperanto – landa Aocio en Togolando (2005 – 2006) kaj aŭtoro de pluraj kantoj orginale verkitaj kaj tradukitaj en Esperanto.

Certe niaj junaj Esperantistoj kaj ilia instruisto ĝojos ricevi gratulmesaĝojn, leg- kaj lerno-materialojn kaj ankaŭ korespondpetojn de similaj klasoj tra la mondo. Tiuj, kiuj interesiĝas pri tiu ĉi agado povas kontakti kun s-ro Amevor Koadjo telefone je +228 92 73 86 01 aŭ rete per: maurice.amevor@yahoo.fr aŭ ankoraŭ kun la lernejo *King's Tech* je: dkingstech@yahoo.fr

**Babilanto**

"Ĉiu el ni devas studi Esperanton kaj disvastigi ĝin laŭ sia eblo, por ke ĝi estu tagon post tago pli vaste konata, por ke ĝi estu akceptita de ĉiuj nacioj kaj registaroj de la mondo, kaj fariĝu parto de la programo en ĉiuj publikaj lernejoj".

# Movoj en Suda Kivu, DR Kongo

En Ogusto ni multe klopodis danke al subteno el Sat-Amikaro por la varbado de novaj lernantoj, kaj ni finfine sukcesis malfermi alian klubon en la lernejo "Herbart". La klubo nuntempe havas 6 membrojn, ĝi funkcias sub la respondeco de mia malnova juna lernanto Justin. Tiun ĉi oni vidas sur la afiŝo de la sesa Afrika Kongreso de Esperanto, kiu okazos sekvjare en Burundo. Pluokazas la vespera kurso de Esperanto, same kiel instigado al gelernantoj praktiki vigle la lingvon kun proksimuloj kaj uzi ĝin en la reto, kvankam la reto estas malfacile alirebla por multaj lokanoj.

Ni ankoraŭ klopodas por faciligi la retumadon al la gelernantoj, ĉar la uzo de interreto multe helpas pliriĉigi sian Esperanto-konon. Iu bonkora amiko eĉ bonvolis krei retejon pri nia agado en Suda Kivu. Pro kurenta problemo, ni ne jam komencis la laboron, sed ni ja esperas sukcesan retejon.


Destre ĉe la nigra tabulo: Jeremie

**Jeremie K. Jacques**

## Nova E-Klubo en Benino

Estas vere grave, ke en Kotonuo, Benino, Esperanto estas tre malmulte konata en la medio de altlernejoj. Jen kial mi klopodis starigi grupon de Esperanto kun universitatanoj. La grupo sidejas ne for de la vojkruciĝo de la agrikultura lertigejo ITT tre konata. Ĝi kursumas 2 foje monate.

Ni sendas koran saluton al UEA kaj al ĉiuj Esperantistoj kaj petas al ĉiuj materiale subteni la junan klubon. Tiuj, kiuj dezirus voĉe kuraĝigi aŭ babili kun ni povas tion fari telefone per la sekva numero: +229 66922389.

**Agbenou Françis**

Ekde oktobro (eble iom antaŭe) klopodoj estas farataj por reklami Esperanton en Sudano.
Unu el la atingaĵoj nuntempe - tiu ĉi retejo: http//esperantosudan.jimdo.com/
preparita de s-ro Enric Baltasar.

## Ĉu nova elano en Kenjo?

En la urbo Nandi Hills, Kenjo, ni organizis kunvenojn por vigligi la nacian movadon la 19-an de septembro kaj 18-an de oktobro 2015.

La honoraj gastoj tiam estis s-ro Julius Kirwa, s-ro Nelson Rugut kaj aliaj partoprenantoj el aliaj lokoj. S-ro Kirwa informis nin pri la historio de Esperanto en Kenjo. Li rakontis kiel li eklernis la lingvon internacian en la jaro 1982, kiam li estis studento en Eldoreto. Li ankaŭ parolis pri gravaj aspektoj kaj prezentis ideojn por vastigi Esperanton landskale. Li kuraĝigis nin labori kune. S-ro Nelson konsentis kunlabori kune kun ni kaj li fidas la nunan estraron por bone antaŭenigi la movadon.

Tiuj kunvenoj traktis ankaŭ en amika kaj fratiga etoso la temojn: a) ŝanĝo de la nomo de Kenja E-o Junularo al Kenja Esperanto; b) okazigo de kunveno kun monata ofteco; c) interŝanĝo de informoj kaj planado de agado kun aliaj grupoj ekz. de Nakuru, Kapsabet k.t.p; ĉ) organizo de kursoj por tiuj, kiuj deziras lerni Esperanton, kio necesigas studmaterialan subtenon el la Afrika Oficejo en Benino, d) reprezentiĝo de Kenjo dum la sesa Afrika Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Burundo en la tuj sekva jaro.

La kunvenoj tre bone disvolviĝis, tiel ke oni povas nun esperi, ke la movado estos forta kaj funkcios senprobleme. Dankon al ĉiuj, kiuj subtenas nin en tiun novan direkton.

**Raportis Andrew Misoi kaj Sharifa N. Abas**



## Kelkaj ideoj por konstrui kluban vivon



**Kelkaj kenjaj esperantistoj**

La tri specoj de agado en loka klubo estas: **varbado, instruado kaj praktikado**.

La uzado de la lingvo estas la plej grava, kaj la varbado de novaj membroj ne bezonas apartajn klopodojn, se la utiligado de la lingvo estas interesa kaj alloga. Se klubo havas bonan reputacion pri siaj programoj kaj pri amika etoso, ĝi ne plu bezonas altiri novajn lernantojn. Ili venas spontanee.

Jen kelkaj ideoj pri la uzado de la lingvo en klubo:

**1.** La klubkunvenoj okazas ofte kaj oni parolas nur Esperanton. La membroj, kiuj povas rakonti ion interesan, ekzemple la ricevon de eksterlanda letero, diskutigas la enhavon. Oni povas fari komunan respondon.

**2.** Oni rakontas pri libroj aŭ artikoloj ĵus legitaj.

**3.** Oni verkas artikolojn pri la kluba vivo, pri loka vivo, pri la lando. Tiuj artikoloj povas interesi korespondemulojn aŭ klubojn en aliaj landoj.

**4.** Novaj membroj en la klubo ricevas atenton. Ili bezonas kontaktojn en eksterlando, kaj por trovi korespondemulojn ili bezonas helpon. Ili faru priskribon pri si mem (malgrandan biografion) kaj sendu ĝin al Korespondaj Servoj (KSM, Japana Instituto), aŭ al iu kiu anoncis en gazeto, fejsbuka paĝo sian deziron korespondi.

**5.** Kelkaj libroj kaj gazetoj povas funkcii kiel biblioteko. Ĉiu povas prunti kaj legi la librojn. Studlibroj, vortaro, legolibroj, eĉ videosonaĵoj estas tie por ĉiu troveblaj. Se la klubo ne havas propran ĉambron (kio ofte okazas), la biblioteko povas resti en la hejmo de iu membro aŭ lernejo.

**6.** Oni faras muzikon, kantas, dancas. Se unu klubano posedas saĝtelefonon, ekzemple oni povas registri komunajn kantojn en Esperanto kaj afiŝi ĝin en la reto.

**7.** Festoj, ekskursoj, komunaj manĝoj, ktp estas ĉiam agrablaj momentoj. Sed... oni parolas nur en Esperanto.

**(INTER NI)**


### Subtenu la revuon « Babilanto »

La revuo *Babilanto* estas trimonata periodaĵo preparata en Togolando kaj eldonata de Agado por la Progresigo de Esperanto en Togolando (APETO).
Ĉu vi dezirus subteni ĝin? Ĉiuj povas elŝulti kaj legi ĝin senpage! Bonvolu enrigardi: www.esperanto-en-togolando.jimdo.com




## Bonvenon al Rumonge, Burundo 2016 !

La 6-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE6) okazos en aŭgusto 2016 en Rumonge, Burundo de la 13-a ĝis la 20-a de aŭgusto 2016, en la Pentekosta centro fronte al la lago Tanganjiko, ĉ. 70 km de la ĉefurbo Buĝumburo. La 3-a Afrika AMO-seminario okazos kun du komunaj tagoj de AKE-6, aranĝo preparata de Afrika Komisiono kaj Burunda asocio de UEA.

Pliaj informoj pri la ejo, kostoj ktp troviĝas en la oficiala retejo: http://www.esperanto-afriko.org

Oni elektu AKE6 en 2016. Diskuta grupo: ake-2016@yahoogroupes.fr

Detala programo estas rigardebla en la oficiala retejo.

Komuniko de UEA pri la Kongreso: http://www.uea.org/aktuale/komunikoj/2015/6-a-Afrika-Kongreso-de-Esperanto-okazos-en-Burundo-en-2016

**El EKO 45**

## Kiel atingi Rumonge

Rumonge estas je 72 km sude de la ĉefurbo Buĝumburo. De tie por atingi la kongreslokon Rumonge, la vojaĝo per linia buso daŭras 2 horojn, kaj koste varias ĉirkaŭ 2 eŭrojn. De la flughaveno ĝis la busstacio, la vojaĝo per taksio daŭras 30 mn kun varia prezo, sed kadre de AKE6, Buĝumburaj Esperantistoj atendos alilandanojn ĉe la flughaveno por iel helpi.

Per taksio, la veturado kostas 20 eŭrojn de la ĉefurbo. La bushaltejo de Rumonge estas je 150 m de la kongresejo do, ĝi estas facile atingebla de ĉiuj. Certe estos afiŝoj, kiuj montros la vojon kaj E-istoj tie por bonvenigi vin!

## Ĉeĥoj el Sudafriko

En la kadro de la agado en la landoj BRICS, okazis en Suda Afriko laborkunveno kun Dr Fu, estro de Confucea Instituto. Estis la 30-a de septembre ĉe la Durbana Universitato de Teknologio (DUT).

Interŝanĝe kun Dr Fu estiĝis konsento pri enkonduko de E-kurso en Konfucea Instituto al studentoj, kiuj dezirus lerni ĝin kaj inverse kurso de Mandareno al dezirantaj Esperantistoj. Espereble, mi iam kapablos pruvi post eksperimento, ĉu la lernado de Esperanto pli faciligas la lernadon de Mandarena?

Menciindas, ke dumkunvene mi transdonis al Dr Fu la libreton: *La Praga Manifesto* kun la tradukita teksto en Mandarenon.

**Elisée Byelongo Isheloke**


Past. Elisée Isheloke kaj Dr Fu

## Deziras korespondi...



Mi nomiĝas Bekounim Tchomela N'Yabé. Mi estas 23 jaraĝa fraŭlo, studento en la universitato de Lomeo, Togolando, pri biologio. Mi havas 14 gefratojn. Mi komencis lerni E-on en tiu ĉi jaro. Mi ŝatas sportumi, retumi kaj legi librojn. Mi deziras korespondi kun la tuta mondo por plibonigi mian Esperanton, kaj mi volonte bonvenigas proponojn pri amikiĝo al la sekvaj adresoj: poŝtelefono: +228 90 66 32 59; Poŝtkesto: s/c UL B.P. 1515 Lomé – TG; retpoŝto: nyabekounim@gmail.com

## Ni subtenas AKE 2016 !

Certe vi estas multaj, kiuj subtenas la ideon de la Afrika Kongreso de Esperanto. Kelkaj el vi eĉ kontribuis iom en la kampanjo por subteni la ĉeeston de tiom da aktivuloj el la kontinento al la renkontiĝo en Rumonge, Burundo 2016.

Fine de oktobro oni kalkulis ĉiujn kolektitajn monerojn. Estis kuraĝiga rezulto: sumo egala al pluraj centoj da eŭroj transskribiĝis nome de la sesa AKE. Koran dankon al ĉiuj donacintoj. Sed la kolektita sumo apenaŭ sufiĉas por pagi vojaĝkostojn de deko da kongresanoj el la najbaraj landoj de Burundo.

Ĉar daŭre venas pliaj petoj por partopreni la kongreson el la najbaraj landoj, Afrika Komisiono de UEA ŝatus denove alvoki al ĉiuj bonkoraj Esperantistoj kontribui, ĉu per pago de aliĝkotizo por du aŭ kvar Afrikanoj, ĉu per pago de 200 eŭroj por kovri vojaĝkostojn de unu el la meritplenaj Esperantistoj, ĉu per *subtena aliĝo.

Tiuj, kiuj dezirus disponigi pagon aŭ donacon al la konto "Afriko" kun indiko "AKE-2016", bonvolu kontakti perletere la financan fakon de UEA je financoj@co.uea.org kun kopio al ake-2016@yahoogroupes.fr.

Ni estas dankemaj pro ĉiu kontribuo, eĉ la plej malgranda estas tre bonvena.

* Tio estas, ke la interesuloj aliĝas kaj pagas la kongreskotizon en sia nomo. Poste, kiam venos la eblo mendi hotelon, manĝojn kaj ekskursojn, ili mendos nenion. Ilia kongreskotizo estos donaco al la kongresa kaso. Ilia nomo aperos en la kongresa kajero. Oni antaŭvidas, ke estos iu stelo apud ilia nomo por montri, ke ili faris subtenan aliĝon kaj ne fizike partoprenos.

Rumonge 2016
Afrika Kongreso
Ni subtenas !

# Praktikaj sciigoj pri la Afrika Kongreso de Esperanto 2016

## Lago Tanganjiko



Estas la plej granda dolĉa lago kaj la dua plej profunda en la mondo post la lago Bajkalo en Siberio. Ĝi kuŝas meze de naturaj belaĵoj kaj atingas la riveron Kongo kaj Atlantikan Oceanon. Burundo, Tanzanio, DR Kongo kaj Zambio profitas partojn de la lago, kiu kovras areon de 32.900 km2.

Tanganjika lago estas ne nur turisma distraĵloko; ĝiaj ĉirkaŭaĵoj estas ankaŭ aranĝitaj por diversaj ekonomiaj aktivaĵoj. Minoj, bredado kaj agrikulturo estas la ĉefaj ekonomiaj aktivecoj surlokaj. Fiŝkaptado estas ankaŭ grava industrio en la lago, kun grandaj varioj de fiŝoj. Novaj specioj de fiŝoj estas ankaŭ regule trovitaj en la lago 350 specioj de ekzistantaj fiŝoj.

La transportiloj sur la lago estas pramoj, kiuj funkcias inter Kigomo kaj Buĵumburo. Kun averaĝa larĝeco de 50 km, Tanganjika lago prezentas multajn eblojn por akvosportoj. Subakva plonĝado, spirhalta plonĝado kaj la naĝado estas la malsamaj aktivecoj, kiujn oni ŝatas en la lago. En multaj zonoj de la lago, fosilioj de raraj specioj de fiŝoj kaj akvaj bestoj troviĝas. La lago ankaŭ provizas pri multaj ekipaĵoj kaj temoj de esplorado kaj evoluado por la maraj sciencoj.



## Aliĝkotizoj

La baza aliĝkotizo dependas de tri landokategorioj kaj tri aliĝdatoj. ***(Loĝado, manĝado, ekskursoj k.a. servoj pagendas aparte por alikontinentanoj).***

A = Norda Ameriko, Okcidenta Eŭropo, Japanio, suda Koreio, Israelo

B = Landoj de orienta Eŭropo, landoj de suda Ameriko, Ĉinio

C = Afrikanoj

| Aliĝperiodo | **ĝis** 31.12.15 | | | **ĝis** 30.05.16 | | | **Dumkongrese** | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Aliĝkategorio | A | B | C | A | B | C | A | B | C |
| Kotizoj en EUR | 20 | 15 | 2 | 30 | 25 | 5 | 40 | 35 | 10 |

*****************

## Loĝado

En la kongresejo, krom amasloĝejo, estas unu-, du-, tri kaj kvar-litaj ĉambroj ĉar ĝi estas centro de Pentekosta eklezio. Eblas loĝi tie ege malmultkoste. Tamen en la urbo estas hoteloj kun prezoj ekde 20 € ĉiutage.

********

## Manĝado

La kongreso disponos simplajn burundajn manĝojn (po tri (03) tage: maten, tag- kaj vesper- manĝoj) al ĉiuj gekongresanoj, kiuj pagis siajn aliĝkotizojn.

Ĉar gastoj estas reĝoj, oni klopodos, ke ili ne havu problemojn pri manĝado. KOKO, laŭbezone, proponos al ili apartan manĝon. Tiukaze, la interesiĝantoj bonvolu antaŭkalkuli ĉiutage 10 €, kaj la kongreso ĉiam liveros al ili la preferatan manĝon, ĉu kafon, ĉu verdaĵojn, ĉu specialan bulkon.

***Ĉiuj manĝoj okazos en la kongresejo, ĉiuj partoprenantoj kune.***

**************

## Ekskursoj

DT1 duontaga al arbaro de Kigwena 10 €

DT2 duontaga per buso al *Mugara* 10 €

TT tuttaga (loko decidota) 20 €

***Ĉiu ekskurso okazos, kondiĉe ke minimume 15 (dek kvin) personoj aliĝos.***

Pretigita de Afrika Komisiono kunlabore kun la burunda asocio de UEA

## Bonvenon al la 6-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE 6)



**13-20 aŭgusto 2016**

**"Esperanto, ilo por paco kaj disvolviĝo"**

Por skribi al la organiza komitato:
ake-2016@yahoogroupes.fr

Bonvolu ankaŭ viziti la retpaĝaron:
www.esperanto-afriko.org

## Rumonge, Burundo 2016

Karaj Geesperantistoj,

ANEB, la landa asocio en Burundo, estas la kunorganizanto de la sesa Afrika Kongreso de Esperanto (AKE6). Tiu ĉi kongreso okazos en la urbo Rumonge, de la 13-a ĝis la 20-a de aŭgusto 2016 sub la temo: "Esperanto, ilo por paco kaj disvolviĝo".

La preparoj por la kongreso en Rumonge kreskas, la laboro akumuliĝas kaj la kunsidoj same kiel traktoj multobliĝas. La Kongresa Organiza Komitato (KOKO) disdonis la taskojn, regule renkontiĝas kaj starigis taŭgajn metodojn por certigi sekuran, bonan kaj sukcesan organizadon de la evento.

Rumonge, 70 km oriente de Buĵumburo, estas la urbo en kiu konstruiĝis E-biblioteko. Temas pri konstruaĵo entenanta plurajn ĉambrojn i.a kunvenejon, gastĉambrojn, klasojn... Ĝi konstruiĝis dum kvar jaroj danke al la fondaĵo "*Esperanto en Evoluo*" kaj solene malfermiĝis al la publiko la 7-an de septembro 2013.

AKE estas tutkontinenta manifestacio de la parolantoj de Esperanto. Ĝi celas fortigi la solidarecon inter afrikanoj, progresigi la movadon kaj studi ĝiajn problemojn. Kvankam tiu tradicio ekis en 1990 kaj do estos jam 26-jara en 2016, la AKE en Rumonge portos la numeron 6, ĉar dum la periodo 1997-2012 ĝi ne povis okazi.

Eble pro iu aŭ alia kialo, vi mem ne povos ĉeesti la kongreson por rekte kontribui al ĝia riĉiĝo. Sed vi ja povas subteni la aranĝon, ĉu organizante reklamon pri ĝi, ĉu donacante monsumon al la *Fondaĵo Afriko* ĉe UEA kun indiko "AKE 2016". Bonvolu senhezite helpi por la vigligo kaj fortigo de Esperanto en Afriko. Ni antaŭdankas vin!

**Adjévi Adjé, kunordiganto de Afrika Komisiono**

## Bonvenon en Burundo

### Mapo de Burundo




### Folklora grupo en Rumonge



## Informe...

Kvankam temas pri Afrika kongreso, AKE tradicie rolas kiel okazo por Esperanto-parolantoj el Afriko kaj aliaj mondpartoj kunsidi kaj pridiskuti staton de la movado en la kontinento. Ankaŭ por amuziĝi kaj ĝui tiun internacian etoson.

Estas vere, ke jam dekomence, AKE iĝis kvazaŭ monda evento, ĉar en ĝi partoprenas geesperantistoj el aliaj kontinentoj. Kaj eksterafrikaj gastoj ankaŭ anonciĝas por 2016!

La aranĝo kunigas ĝenerale gejunulojn, kiuj partoprenas en la kutime interesaj kaj variaj programeroj. Ĉiam estas okazo labori, lerni, sperti novajn aferojn, amikiĝi, renkonti aktivulojn nur letere konitaj, sed ankaŭ danci, ĉeesti teatraĵojn dum la kulturaj vesperoj.



Unu el la plej interesaj programeroj estos la ekskursoj al:

### Arbaro de Kigwena

Peri-gvinea arbaro, riĉega en flaŭro kaj faŭno: superabunda vegetaĵaro, grandaj Calaos (birdoj), diversaj simioj (el kiuj pavianoj vivas en grandaj familioj kaj aliaj primatoj), sed ankaŭ multaj specioj de birdoj kaj papilioj. Temas pri pitoreska arbaro, unuunura en Burundo, ĉar estas la sola natura ekvatora rezervo en la lando. Ĉiĉerono gvidas la vizitantojn tra la arbaro per labirintaj vojoj.